

# La 10an de novembro 2017

## Trump vizitis Japanion kaj aziajn landojn



La 5an de novembro la usona prezidento Donald Trump vizitis Japanion en sia unua vojaĝo al Azio kiel la prezidento. Sed li venis ne al la internacia flughaveno

de Tokio, sed al la usona bazo Jokota situanta en la gubernio Tokio kaj la unua saluto okazis en la bazo al la usonaj soldatoj. Ĉu tio ne estas granda ofendo al Japanio? Sed la registaro neniam kritikis lin pro tio.

Dum sia 3-taga restado en Japanio, li ludis golfon kun nia ĉefministro Abe, manĝis kune kaj amike diskutis pri diversaj temoj. Inter tiuj la korea afero estis la plej grava, ĉar nun Nord-Koreio posedas nukleajn armilojn kaj minacas Usonon.



En tiuj kunsidoj Trump diris, ke Usono havas ĉiujn elektojn sur la tablo, inkludante uzon de militforto al Nord-Koreio. Kaj Abe 100-procente aprobis la sintenon de la

prezidento. Li aldonis, ke « Interparolo por interparolo » estas tute senutila kaj nun estas tempo pli fortigi premon al Nord-Koreio. Sed lia aprobo de uzo de militforto tute kontraŭas nian konstitucion. La artikolo 9 en ĝi jene deklaras :

## Artikolo 9

(1) Sincere aspirante internacian pacon bazitan sur justeco kaj ordo, la japana popolo por ĉiam rezignas militon kiel suverenan rajton de la regno kaj la minacon per armita forto aŭ la uzon de armita forto kiel rimedojn por solvi internaciajn konfliktojn.


(2) Por atingi la celon menciitan en la antaŭa paragrafo, tera, mara kaj aera armeoj aŭ aliaj militfortoj neniam estu tenataj. La rajto de militado de la Regno ne estas agnoskita.

## **Japanio ĉiel devas eviti militon**

Eĉ « interparolo por interparolo » estas grava. Dume la koncernataj landoj ne okazigas militon. Sed kiam Trump kaj Abe rifuzis interparolon kun Kim, la gvidanto de Nord-Koreio, li ne havas alian elekton krom silenti aŭ militi. Kiam Usono minacas lin per armiloj, li eĉ havas rajton uzi sian militforton.

Se Usono atakos Nord-Koreion, Kim senprokraste atakos usonajn militbazojn en Japanio, certe unue bazojn en Okinavo, kaj momente Okinavo malaperos. Usono estas malproksima de tiu kaj grandega, do eĉ se tiu atakos ĝin per nukleaj armiloj, damaĝoj estos ne tiel grandaj, sed

Japanio estas proksima kaj malgranda, tial eĉ malmalmodernaj misiloj kaj raketoj povos doni grandan damaĝon al ĝi, krome, se Nord-Koreio atakos nukleajn reaktrojn situantajn marbore de la Japana Maro, en kies alia flanko estas Nord-Koreio, Japanio fariĝos nelogebla pro radioaktiveco. Eĉ se Japanio gardos sin per la plej modernaj usonaj armiloj, ĝi ne povos protekti sin perfekte.



 **montras la lokon, kie estas nuklea centralo.**

Nukleaj centraloj laŭ la marbordo estas kvazaŭ atombomboj facile uzablaj de malamikoj. Por ataki ilin, nur bazukoj estos sufiĉaj. Nokte oni povas proksimiĝi al nukleaj centraloj eĉ per simpla ŝipo kaj povas facile detrui ilin. Dum Japanio posedas nukleajn centralojn, ĝi neniam venkos en milito. Tial Japanio devas ĉiel eviti militon.

Subteno de Abe al Trump signifas eblan pereon de Japanio. Multaj homoj tre timas tion, kaj strevas forpeli Abe-on de sia posteno.

## Ĉu la regantoj estas komercistoj?



Trump postulis, ke Japanio aĉetu kvantegon da usonaj armiloj por la usona ekonomio. Kaj Abe tuj promesis tion. Jam du monatojn antaŭe la japana ministro pri eksteraj aferoj promesis aĉeti du “*Aegis Ashore*”-ojn (supra foto), kiuj kontraŭbatalas nordkoreajn misilojn de sur tero, ne de la ŝipoj. Ili kostas entute 160 miliardojn da enoj (1,6 miliardojn da eŭroj). En la kunsido kun Trump,

Abe promesis aĉeton de multekostaj *Stelth-Airkraft*-oj (suba foto), kiuj povas, duone sin kaŝante kontraŭ radaro, ataki aŭ bombardi malamikojn. Se Abe uzus tiom da mono por bonfarto de la popolanoj, kiel feliĉaj ili estus! Aĉeto de armiloj tute ne donas feliĉon al la popolanoj, male detruon al ili.

Eksa prezidento Obama ne multe sukcesis disvastigi pacon en la mondo, sed liaj prelegoj estas filozofiaj kaj aŭskultindaj. Kompare kun li, kiel malaltnivela estas Trump, kaj same, kiel malaltnivela estas nia ĉefministro Abe! Ili devus gvidi la mondon en pacon, sed ili nur agitas la mondon al milito. Abe povos detrui Japanion, sekvante agreseman politikon de Trump.

La japanoj estas tre obeemaj kaj modestaj, tial bedaŭrinde en Japanio ne multe okazis manifestacioj kontraŭ Trump, sed en Koreio okazis grandaj manifestacioj. Ankaŭ en Filipinoj okazis grandaj manifestacioj. Filipina juna esperantisto s-ro Albert Stalin Garrido, 19-jara studento, sendis al ni raporton pri la manifestacioj kontraŭ Trump.

### **La 13an de novembro 2017**

Filipinanoj lanĉas seriojn de manifestacioj kontraŭ la nun okazanta pintkunveno de la t.n. Asocio de Sudorientaziaj Landoj (angle: Association of Southeast Asian Nations, ASEAN), specife kontraŭ usona imperiismo kaj ĝia nuna ĉefo, prezidento Donald Trump, kiu nun estas en nia lando.

Filipinanoj kredas, ke ASEAN estas instrumento de Usono por plifortigi sian tenon de potenco laŭ politika, ekonomia kaj milita faktoroj super la sudorientazia regiono, kvankam Usono fakte ne apartenas al ĝi. Plie, interalie la pintkunveno ebligis multajn interkonsentojn, kiuj pli profunde enkondukos liberan komercadon – tiel pli forte endanĝerigonta la lokajn entreprenojn kaj

produktojn de la lando.

Partoprenanta la pintkunvenon estas ankaŭ Shinzo Abe, ĉefministro de Japanio. Kredeble, li volas uzi ĉi tiun kunvenon por puŝi militisman alvenon al la problemo pri Nord-Koreio, same kiel Trump. Fakte, pritrakti Nord-Koreion estas unu el la ĉefaj tagorderoj de ĉi tiu kunveno. Ĉeestas ankaŭ Justin Trudeau, ĉefministro de Kanado, kiu ankoraŭ ne pritraktas la problemon pri kelkaj tunoj da rubaĵoj enŝipitaj al Filipinoj de sia lando.



La manifestaciantoj nun okupas ĉiujn placojn proksime al la usona ambasadejo, proksime al la pintkunvenejo. Multaj sociaj sektoroj ĉeestas: gejunuloj, laboristoj, farmistoj, virinoj, urbaj malriĉuloj, indiĝenaj

popoloj, viktimoj de la lastatempa milito kontraŭ ekstremistoj en la suda urbo Marawi.

La manifestacioj tamen ne estas pacaj – dikaj aroj da policanoj kun lignaj batiloj blokas ĉiujn vojojn al la kunveno kaj eĉ utiligas fajrobrigadon por bombi (kredeble malpuran) akvon al manifestaciantoj. Tiu pritrakto pri manifestaciantoj ne ŝanĝiĝos, kaj ili povos uzi pli kruelajn metodojn, ekzemple larmgason. Jam la pasintaj manifestacioj, ĉi-matene la plej lasta, estis kun perforto kaj ĉirkaŭ 20 manifestaciantoj estis vunditaj.

Mi mem ankoraŭ ne aliĝis al la manifestacioj, sed certe hodiaŭ mi iros tien. Ni memoru, ke mi estis portita al la hospitalo antaŭ du jaroj, kiam iu policano forte batis mian manon per ligna bastono. Ĉu mi ricevos eĉ pli fortan, senkoran baton ĉi-foje? Ni vidu kiel perfortemaj estas la ŝtataj agentoj, kiuj ĉiam servas al la regantaj klasoj, uzante forton kontraŭ la popolanoj.

Kiel iris protestoj en viaj landoj? Mi aŭdis, ke ekzemple en Sud-Koreio gejunuloj sukcese lanĉis "pulmprotestojn" kaj eĉ kelkaj opoziciaj parlamentanoj silente protestis, kiam Trump vizitis la nacian parlamenton de Sud-Koreio.

Ni devas kune protesti kontraŭ la usona imperiismo kaj ĉiu politiko, kiun ĝi altrudas al la azia-pacifika regiono.